OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Sennaciulo




Sennaciulo, marto 2008, n° 03 (1233), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

www.satesperanto.org

# Kongreso de SAT 2008
# En la mondo de la antikvaj tracoj

La tracoj estis mistika popolo kun magia kulturo, kiu unuigas la vitalecon



de la vino kun la profunda mistikismo de la orfismo kun la senmorteco de la homa animo. La tracoj trovas vojon al la



senmorteco kaj la nuna ilia revivigo el la pasinteco pruvas, ke ili sukcesas.

Kiuj estis la tracoj? Ili estis etno-kultura komunaĵo de hindoeŭropaj gentoj, kiuj loĝis en Sudorienta parto de Eŭropo, de Egea maro ĝis la Karpatoj kaj ankaŭ en la nordokcidenta parto de Malgranda Azio, ekde la mezo de II-a jarmilo antaŭ nia



erao ĝis VI-a jarcento post nia erao.

En la valo de Kazanlak loĝis la traca gento Odrisi. Dum la regado de Sevt



III (4-3 jc antaŭ nia erao), ilia ĉefa urbo estis Sevtopolis, kiu troviĝas kvin kilometrojn okcidente de nuna Kazanlak. Bedaŭride nun ĝi estas sub la akvoj de baraĵlago. Apud Kazanlak troviĝas traca tombejo, kies ĉefa parto estas rondforma kupola kamero. La plej valoraj estas la murpentraĵoj en la koridoro kaj la kamero, kiuj prezentas okazaĵojn el la




vivo de la entombigita traca reganto. Ne malproksime de Kazanlak estas traca altaĵeto (monteto) “Goljama kosmatka”, sub kies grundtavolo oni malkovris tracan sanktejon, kiu poste fariĝis tombejo de reganto Sevt III. En la traca



monteto “Svetica” (Sanktulino) oni trovis postmortan oran maskon de la reganto kaj lian stampilon. En diversaj partoj de Bulgario oni trovis tracajn restaĵojn kaj mirindajn artajn objektojn el oro.

Ĉiujare, dum la unua semajno de septembro, okazas Festoj en la Valo de la tracaj reĝoj kun riĉa kaj interesa amuza, kultura, programo..

S.D.



Karaj gekamaradoj,

Jen la marta numero de Sennaciulo. Kiel dirite, ĝi reiĝas unumonata, kaj same estos pri la aprila, dum en majo/junio denove estos duobla numero. Bonvenaj estos viaj komentoj pri la respektivaj kvalitoj de ambaŭ sistemoj.

La redaktejo ricevis sufiĉe abundan materialon, kiu iom post iom estos publikigita. Se vi ne ricevis ateston pri ricevo de sendita artikolo, nepre petu konfirmon de la redaktejo, por eviti perdon de manuskripto.

Krome, ne forgesu aliĝi al la kongreso, kaj kandidati por la renovigo de ĜK-aro kaj PK.

Venontaj dosiertemoj estos:

- en aprilo: **Historio** (vidu pli detalan priskribon en la antaŭa Sulo). Kontribuojn sendu al: Tonyo DELBARRIO, Inspector Juan A. Bueno 11-7° D, ES-28924 ALCORCON,

<tonyodelbarrio@gmail.com>.

- en majo/junio: sekvo de la dosiero pri **Naciecaj problemoj** kaj **"Virinaj rajtoj tra la mondo"**. Pri ĉi tiu lasta temo demandaro estas en preparo. Kontribuojn sendu al Tereza KAPISTA, Studentska 39/23, RS-11070 NOVI BEOGRAD,

<terezesp@eunet.yu>.

Adreso de demandaro:

http://www.satesperanto.org/Venontaj-numeroj-de-Sennaciulo.html

Kamaradece, La redaktoskipo



# Naciecaj problemoj

## Enkonduke

Naciecaj problemoj – jen problemoj, kiujn esperantistoj ekde la komenco ofte kaj pasie debatas. Naciecaj problemoj konsistigas grandan parton de tio, pri kio teoriumas naciistoj, internaciistoj, sennaciistoj. Klare do, ke ankaŭ SAT reflektas ilin.

La "interna ideo", kiel ĝin formulis Zamenhof, estis ideo de etna, nacia kaj religia tolerado sur la individua nivelo, sed samtempe ankaŭ ideo pri la rolo de Esperanto kiel rimedo por akceli justajn rilatojn inter etnaj, naciaj kaj religiaj komunumoj. Kiaj rilatoj estas justaj rilatoj? Ĉu kaj kiel Esperanto povas akceli ilin? Estas multe da loko por disopiniado.

En la ideologia historio de esperantistoj kaj pli specife de SAT-anoj estis multe da oscilado inter universalismo kaj partikularismo. Tiu antinomio – ĉeesta en iu ajn debato pri naciecaj problemoj – provokis verŝajne pli fortan interkontestadon inter esperantistoj ol la kontraŭdiro inter "maldekstro" kaj "dekstro".

Do ne devus surprizi la multaj pozitivaj reagoj de kamaradoj al la alvoko artikoli por la dosiero de ĉi tiu numero. Estiĝis la embaraso, ke da artikoloj estas tro por tuja aperigo. Ni pardonpetas al tiuj, kies kontribuoj ne povis aperi ĉi-numere. Ni provos aperigi ilin sen tro da malfruiĝo en postaj numeroj.

Gary Mickle

---

## LA FRONTPAĜA BILDO

prezentas vidaĵon troveblan ne nur en Korsiko, la insulo, kies konturojn la satelita foto montras. Kiam rivalantaj naciismoj – ĉi-kaze la franca kaj la korsika – disputas pri tio, kies kolektiva «proprietaĵo» estas iu teritorio, la elekto de la «ĝusta» formo de loknomoj fariĝas politikaĵo. Tiam vojŝildoj fariĝas afiŝtabuloj de naciismaj kredkonfesoj. Regantecon alstrebanta naciistaro kontestas per superŝprucado la nomformon uzatan de la reganta naciistaro.

Ankaŭ Esperantio ne estas sufiĉe kosmopolita por stari flanke de tiaj konfliktoj. En ĝi la naciistoj pridisputas ne la nomformojn sur vojŝildoj, sed la esperantigon de loknomoj. Por grupo de katalunaj esperantistoj tiom gravis la demando, ĉu la urbo Alicante (hispane) / Alacant (valencie) nomiĝu en Esperanto «Alikanto» aŭ «Alakanto», ke ili publikigis deklaracion (Por la lingva demokratio) pri tiu temo en 2002. Ili kritikis SAT kaj la Hispanan Esperanto-Federacion pro ties uzado de «Alikanto», sugestante, ke neuzo de «Alakanto» egalas al manko de «progresema» starpunkto.

Ne jam klaras, ĉu tia etnisme konceptita «lingva demokratio» (asertado de grupaj posedpretendoj per lingvaj manipuloj) aŭ «sengenteco de la tero» (kiel Zamenhof formulis ĝin) iĝos gvida ideo inter esperantistoj – kiuj en tiu rilato tute ne diferencas de la cetera mondo.

Gary Mickle

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN :FR41 1000 0101 2342 2K02 064 - BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
**Plenum-Komitato de SAT** :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.

**Redakta Komitato** - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Hans Georg Kaiser. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
9 771163 044279
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.